

BRAZILA ESPERANTISTO

77-a Jaro

Julio-Septembro 1983

N-ro 278



Skulptaĵo de la brazila artisto Antônio Francisco Lisboa, la Kripuleto (1730-1814).
(Foto el *Turisma Brazilo*)

Julio-Septembro 1983

77-a Jaro

N-ro 278

Brazila Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo,
societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto n-ro 4.356, 26/10/1921

Respondeca Direktoro: Fernando Marinho
Redaktoro: Luiz A. B. Martins

Administracio kaj Redakcio:
Praça da República, 54 - 2º
20211 - Rio de Janeiro, RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 10 respondkuponoj

SERVIÇOS DE LIVROS

Brand, Ibsen. Trad. el la novgera lingvo de Erling Anker Haugen. Serio "Oriento-Okcidento" n-ro 13	1.500,00
Cu li fariĝis sufiĉe?, Johán Valano. Krim-romano originale verkita en Esperanto	850,00
De paŝo al paŝo, Lajos Tárkony. La verko enhavas literaturajn profilojn de hungara Esperanta literaturo en la jaroj 1930	850,00
La Dia Avarulo, Jan Dobraczyński. Trad. el la pola lingvo de B. Monkiewicz.	1.000,00
Dio rekompencu vin, Joracy Camargo. Komedio en tri aktoj el la portugala lingvo tradukita de Sylvio Peixoto.	400,00
Einstein. La enigmo de la Matematiko, Huberto Rohden. Trad. Délio Pereira de Souza.	780,00
El la "Verda Biblio", I. Lejzerowicz	600,00
El la "Camera Obscura", Hildebrand. Trad. el la holanda originalo de H.C. Mees. Kolekto de rakontoj.	100,00
El Orienta Florbado, Kenji Ossaka	300,00
Elektitaj Versaĵoj, Georgo Deŝkin.	300,00
Elektitaj Versaĵoj, Nikola Vapcarov. Diversaj tradukintoj.	200,00
En Maskobalo, Julio Baghy. Kvin unuaktaĵoj	900,00
Enkonduko en la Bazajn Principojn de la Psikodiagnozo Miokinetika, de D-ro Emilio Mira Y López, G. Villas Bôas Passos.	200,00
Enkonduko al Ekumenaj Problemoj, Władysław Miziołek. El la pola lingvo trad. Blesław Monkiewicz.	600,00

Liga Brasileira de Esperanto

Quota anual de adesão

1983

M S categoria destinada aos que não são esperantistas mas simpatizam com o movimento; o sócio tem direito a utilizar a Biblioteca e o serviço de livros, participar das atividades sociais e receber os boletins editados pela Liga. Inscrição:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 1.000,00
b) após 30/06/83 Cr\$ 1.500,00

M 1 categoria destinada àqueles que já estão integrados no movimento esperantista; recebe o mesmo que o M S. Inscrição:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 3.000,00
b) após 30/06/83 Cr\$ 4.500,00

M 2 tem os mesmos direitos que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento. Inscrição:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 9.000,00
b) após 30/06/83 Cr\$ 13.500,00

D M categoria destinada àqueles que desejam integrar o quadro social da Liga na qualidade de Membro Vitalício. Paga a importância correspondente a 30 vezes o valor da quota M 1. Tem os mesmos direitos que o M 2. Pagamento:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 90.000,00
b) após 30/06/83 Cr\$ 135.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da Liga Brasileira de Esperanto: Praça da República, 54 - 2º andar, 20.211 - Rio de Janeiro, RJ.

Curso por Correspondência

A Liga Brasileira de Esperanto mantém os seguintes cursos por correspondência: básico, de aperfeiçoamento, superior e magistral.

Taxa de inscrição:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 6.000,00
b) após 30/06/83 Cr\$ 9.000,00

A taxa de inscrição é a mesma para todos os cursos.

Os cursos são privativos dos sócios da Liga.

A inscrição para os cursos por correspondência poderá ser feita em qualquer época do ano.

Raporto de la Prezidanto

Kvankam la nuna Estraro estis elektita en Decembro 1981, ĝi ricevis plenan povon gvidi nian Institucion fine de 1982. En la unuaj ses monatoj, ni iom laboris kaj nun ni prezentas al vi kelkajn informojn pri niaj atingoj, planoj kaj problemoj.

Ekzamenante la Generalan Laborplanon por 1982-1985, prezentitan en la Ordinara Ĝenerala Kunsido okazinta en Decembro 1981, ni venas al konkludo, ke la laboro iras sufiĉe bone, kvankam ni daŭre frontas plurajn malfacilaĵojn.

1. Atingoj

1. Rilataj al Informado.

1.1 - **Brazila Esperantisto.** Dank' al la laboro de nia Ĝenerala Sekretario Luiz Alberto Martins ni sukcesis reaperigi ĉi tiun delonge atenditan bultenon. La unua numero de 1983 estis ĝustatempe dissendita kaj la dua jam estas kompostita kaj preta por presigo.

1.2 - **Esperanto-Notĉias.** Tiu ĉi nacilingva dupaĝa informilo aperas laŭbezone kaj laŭeble. Ni jam sukcesis aperigi 5 numerojn. Ĝi estas dissendita al pli ol 500 ĵurnalismaj entreprenoj en Brazilo. Ankaŭ ricevas tiun informilon la membroj de B.E.L. kaj la personoj dezirantaj informojn pri Esperanto. Ĝis nun la ĉefa zorganto pri redaktado kaj aperigo de Esperanto-Notĉias estas nia estrarano Aloisio Sartorato.

1.3 - **B.E.L. Informas.** Dupaĝa Esperantlingva informilo. En la kuranta jaro aperis 6 numeroj. Ĝi celas transdoni ĝustatempe la plej urgajn informojn al niaj membroj.

1.4 - **Radiprogramo.** La 17-an de Januaro kaj la 20-an de Junio, Radio Copacabana el Rio de Janeiro disaŭdigis 30-minutajn intervjuojn pri Esperanto. Partoprenis kiel invititoj estraranoj de B.E.L. kaj Prof. Sylla Chaves. Ekde la 3-a de Marto, la sama radistacio dissendas ĉiujauĉe kvinminutan priesperantan programon. Zorgas pri la redaktado kaj prezentado de tiu nacilingva programo nia estrarano Joel Manso

1.5 - **Okazigo de Ekspozicioj.** B.E.L. kunlaboris kun lokaj grupoj kiuj organizis ekspoziciojn pri Esperantaĵoj kaj kun aktivuloj kiuj prelegis pri Esperanto. Por tiuj okazaĵoj ni donacis informilojn aŭ pruntedonis librojn aŭ revuojn. B.E.L. kunlaboris kun Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga kaj kun Sekcio Rio de Janeiro de la Monda Mesiisma Eklezio (Asocio Mokiĉi Okada), ambaŭ en Rio de Janeiro, kaj kun la junulo Patrik Petiot, el Friburgo, kiu sindone laboris por la diskonigo de Esperanto en la festo por la memorigo de la fondiĝo de la urbo Friburgo (RJ).

2. Rilataj al Instruado

Ni daŭre funkciigas kursojn en klaso kaj per korespondado. Nuntempe funkcias baza, perfektiga, supera kaj profesora kursoj. Zorgas pri la kursoj jenaj instruistoj:

a) baza

en klaso: S-ro Jos  Bonif cio

per korespondado: S-roj Celso Martins kaj C lio de Freitas Martins.

b) perfektiga

en klaso: F-ino Izabel Santiago kaj S-rino

May Bijelefeld

per korespondado: S-ro Celso Martins.

c) supera

en klaso: S-ro Jorge Campos de Oliveira

per korespondado: S-ro Floriano Pessoa

 ) profesora

per korespondado: S-ro Floriano Pessoa

Nia vicprezidanto S-ro Floriano Pessoa estas la reprezentanto de B.E.L.   la Internacia Ekzamena Komisiono.

3. Rilataj al Praktika Utiligo

3.1 - Sociataj kunvenoj

- La 23-an de Aprilo, D-ro Diderto Freto prelegis en nia sidejo okaze de la lan o de sia libro "Mikronoj" (distikoj el monosilabaj versoj);

la 28-an de Majo, Prof. Sylla Chaves pre-

legis pri siaj lastaj verkoj kaj projekciis belajn lumbildojn rilatajn al la libro "Bestetoj, Bestegoj kaj Bestaĉoj". En la sama vespero oni prezentis tre interesan aŭdvidan materialon, kiu estas eldonota de brazila firmao, pri turismaj aspektoj de nia lando, kun teksto en Esperanto.

3.2 - **Biblioteko.** Antaŭ kelkaj tagoj Fino Izabel Santiago akceptis volontule zorgi pri nia Biblioteko.

3.3 - **Libroservo.** Malmultfoje ni mendas novajn librojn por nia stoko. La konstanta kurzofalo kaj la malfacileco por monsendo senkuraĝigas grandajn mendojn. Ni atentigas vin, ke la ĉefa fonto de rimedoj por daŭra ekzistado de nia Ligo ankoraŭ estas nia libroservo.

3.4 - **Naciaj kaj Internaciaj Kongresoj kaj Renkontiĝoj.** Laŭ promesite en nia Laborplano kaj dank' al la informiloj disponeblaj ni ofte disvastigas informojn pri tiuj okazaĵoj. B.E.L. sendis reprezentanton al jenaj renkontiĝoj:

a) La Prezidanto de B.E.L. partoprenis en la III-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto, okazinta en Decembro 1982;

b) D-ro Elmano Barbosa reprezentis B.E.L. en la 5-a Brazila Junulara Kongreso, en Iporá, Stato Goiás (Januaro 83);

c) Prof. Sylla Chaves reprezentis B.E.L. okaze de la Semajno de Internacia Amikeco ĉe Esperanto-Klubo de Sorokaba (Februaro 83) kaj okaze de la 9-a Esperanto-Renkontiĝo en São Paulo (Majo 83);

ĉ) La Prezidanto de B.E.L. ĉeestis ceremonion honore al Zamenhof organizitan de Niterói Esperanto-Klubo (Aprilo 83);

d) S-ro Celso Martins reprezentis B.E.L. ĉe Esperantista Kunfratiĝo okazinta en Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga (Aprilo 83).

3.5 - **Eldona Aktiveco.** Ni mencias la jenajn:

- en Februaro 83: lanĉo de la afiŝo-diskokurso "Kio estas Esperanto?", verkita de Sylla Chaves;

- en Marto: aperigo de la 3-a represo de Vocabulário Português-Esperanto/Esperanto-Português de Carlos Domingues;

- en Majo: lanĉoj de la libro kaj de la aŭdvida materialo "Bestetoj, Bestegoj kaj Bestaĉoj", de Sylla Chaves;

survoje: Kanaano, de Graça Aranha, tra-

dukita de A. Caetano Coutino; en kunlaboro kun la entrepreno "V-Som Audiovisuais e Editora Ltda." lanĉo de **Turisma Brazilo**, kolekto de 80 lumbildoj kun kasedo; kaj fine kontakto kun la eldonejo Shogun Arte por reeldono de "Antologio de Brazilaj Rankontoj".

II. Planoj kaj Malfacilaĵoj

Dum la periodo en kiu ni laboris jam kiel Prezidanto de B.E.L. ni multe lernis pri nia Ligo kaj pri ties anaro. Neniam ni dubis pri la trovotaj malfacilaĵoj. Neniam ni pensis fari pli ol ni kapablas kaj tute ne pretendis solvi ĉiujn problemojn, kiujn la antaŭaj prezidantoj - pli kompetentaj ol ni - ne sukcesis solvi. Tial restas nesolvitaj, ekzemple: malaperigo de antaŭjuĝoj pri Esperanto; dekobligo de la nombro de niaj membroj; komprenemo de ĉiuj esperantistoj kaj malapero de ĉiaj kritikoj; aperigo de artikoloj pri Esperanto en elstaraj gazetoj; baldaŭa akiro de nova sidejo k.t.p. Sed tio ne signifas, ke ni ne volas batali por trovi pli favorajn kondiĉojn por la atingo de la Esperanta celo.

Hodiaŭ ni konscias pri la problemoj de la Ligo. La ĉefa estas manko de helpantoj. Estas multe da administraj taskoj kaj malmulte da helpantoj. Ĉar la Ligo estas malriĉa, ĝi ne povas dungi plian oficiston. Tial ni devas kalkuli sur volontulan servon. Kvankam la reago estas malgranda, ni ne perdis la esperon kaj atendas novajn voluntulojn, kiuj povu veni al nia sidejo almenaŭ 3-4 horojn ĉiusemajne. Dum la Generala Laborplano restas la baza gvidilo por la resto de la oficperiodo de la nuna Estraro. Post kiam ni sukcesos disdividi la rutinajn taskojn kaj tiele liberigi la Estraranojn de multvariaj ŝarĝoj, ni povos plene nin dediĉi al aliaj gravaj demandoj kiaj sidejo de B.E.L., centjariĝo de Esperanto, okazigo de Brazila Kongreso, k.t.p. aŭ revu pri aliaj flugoj.

Rio de Janeiro, la 25-an de Junio 1983

Fernando Martinho
Prezidanto

LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO

Ferenc Molnár
Cr\$ 1.000,00

H A J K O J

Diderto Freto

Lampiro flugas,
nokte, en la aero;
viva fajrero!

☆☆☆

Jen papilioj
dancas en la aero:
balet', en vero!

☆☆☆

Lord' kaj pario:
jen ŝokanta kontrasto
en la socio!

☆☆☆

Avide, kun flam',
kolibro en kis' sur flor':
bildo de la am'!

☆☆☆

Sur paper' en blank',
jen la skribo de l' geni':
de l' kre', la magi'!

* *

LIGA BRASILEIRA DE
ESPERANTO

Assembléia Geral Ordinária

Ficam convidados os Srs. Membros da Diretoria, Membros dos Conselhos e Sócios para a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, que será realizada no dia 29 de outubro de 1983.

A Assembléia realizar-se-á na sede da Liga, na Praça da República, 54 - 2º, em hora e com a ordem do dia que serão anunciadas oportunamente.

Rio de Janeiro, 1º de julho de 1983.

Fernando Marinho
Presidente

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
Assembléia Geral Ordinária

Resumo da Ata de 22 de novembro de 1980

No dia 22 de novembro de 1980, reuniu-se a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, sob a presidência do Dr. Sylla Chaves e secretariada pelo Cel. Fernando Marinho.

Quotas anuais de adesão – O Tesoureiro Aloísio Sartorato apresentou – e foi aprovada pela Assembléia – a seguinte tabela de adesão para 1981: até 30.04.81 – MS Cr\$ 160,00; M1 Cr\$ 800,00; M2 Cr\$ 4.000,00; DM Cr\$ 40.000,00; após 30.04.81 – MS Cr\$ 200,00; M1 Cr\$ 1.000,00; M2 Cr\$ 5.000,00; DM Cr\$ 50.000,00.

Atividades para 1981 – O Presidente enfatizou sua preocupação de regularizar a edição dos periódicos da Liga e em apoiar o 66.º Congresso Universal de Esperanto com sua participação como conferencista, como organizador do setor artístico e como representante da própria Liga. Após a realização do 66.º Congresso Universal de Esperanto, a Liga preparar-se-á para as eleições da Diretoria e o Presidente informou que não pretende candidatar-se à reeleição.

Assuntos Gerais – O Vice-Presidente Walter Augusto Francini: a) sugeriu a elaboração de um calendário anual de atividades a fim de se evitar a coincidência de realizações; b) sugeriu que fosse dada atenção especial à divulgação das atividades da Liga e que elas poderiam ser veiculadas em material menos dispendioso como, por exemplo, boletins ou circulares mimeografados; c) ressaltou a importância da divulgação dos Relatórios da Liga; d) convidou os presentes para a distribuição, no dia 15.12.80, dos prêmios do I Concurso Internacional de Trovas. A Sra. Denise Deslandes, do Barra Mansa Esperanto-Klubo, convidou os presentes para as festividades, no dia 22.12.80, para a entrega dos prêmios aos vencedores do concurso de redação escolar com o tema "Esperanto, Língua Internacional."

Nada mais havendo a tratar, o Presidente encerrou a sessão.

☆☆☆

Resumo da Ata de 3 de outubro de 1981

No dia 3 de outubro de 1981, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, sob a presidência do Dr. Sylla Chaves e secretariada pelo Cel. Fernando Marinho.

Relatório da Diretoria – Foi lido e aprovado o Relatório da Diretoria referente ao ano de 1980.

Relatório Financeiro – O tesoureiro Dr. Aloísio Sartorato leu o Relatório Financeiro que compreendia um quadro demonstrativo de despesas e receita e o balanço. Durante a leitura do Relatório Financeiro

apresentaram sugestões ou levantaram questões os sócios: Walter Francini, Jorge Soares das Neves, May Bijleveld, Alfred Karl Gregorius, Roberto Odilon Horta, Calissa Rosa Sartorato e Jorge Campos de Oliveira.

Após a aprovação do Relatório Financeiro, a Assembléia fixou os seguintes valores para as anuidades de 1982: a) inscrições até 30.04.82: MS Cr\$ 500,00; M1 Cr\$ 1.500,00; M2 Cr\$ 4.500,00; b) após 30.04.82: MS Cr\$ 700,00; M1 Cr\$ 2.100,00; M2 Cr\$ 6.300,00.

Assuntos Gerais – O Prof. Walter Francini divulgou o lançamento de dois concursos: o primeiro, patrocinado pela Associação Paulista de Esperanto e destinado a estudantes do curso superior, tem como tema “Concurso de Pensamentos sobre o Esperanto”; o segundo, de iniciativa do Clube Sorocabano de Esperanto, destinado a alunos do 1.º e 2.º graus, tem como tema “Língua Internacional Esperanto”. O Sr. Sylvio Silva: a) informou o aparecimento em Braille do livro “Junulkurso”; b) doou à Biblioteca Carlos Domingues um exemplar de “Paŝoj al Plena Posedo” transcrito em Braille; c) propôs um voto de pesar pelo falecimento do co-idealista Roberto das Neves.

☆☆☆

Resumo da Ata de 12 de dezembro de 1981

No dia 12 de dezembro de 1981, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na forma dos Estatutos.

Situação financeira da Liga – O Presidente informou que, na circular de 26.11.1981, foi exposta em linhas gerais a questão do déficit da Liga e que no relatório anual o assunto será tratado com amplitude; acrescentou que os débitos existentes não serão passados para a nova Diretoria.

Eleição da Diretoria – Foram eleitos os seguintes membros da Diretoria e dos Conselhos Fiscal e Consultivo para o quadriênio 1982-1985: Presidente - Fernando José Galvão Marinho; Vice-Presidente - Floriano Pessoa; Secretário Geral - Luiz Alberto Martins; Primeiro Secretário - Luiz Alan Gomes Romero; Segundo Secretário - Joel Manso; Tesoureiro - Aloísio Sartorato; Conselho Fiscal - Jorge Campos de Oliveira, Mario Ritter Nunes, Sylla Chaves; Conselho Consultivo - Braz Cosenza (RJ), Francisco Barbosa Filho (CE), Carlos A. S. da Cunha (SP), Geraldo Mattos (PR), Ivo Sanguinetti (RS), Jannes Markus Mabe-soone (PE), José Passini (MG), Leopoldo Henrique Knoedt (BA), Walter Augusto Francini (SP), Walter Boppré (SC). A Assembléia autorizou a Diretoria eleita a preencher dois cargos no quadro do Conselho Consultivo.

Posse da nova Diretoria - Ficou deliberado pela Assembléia que a nova Diretoria tomaria posse de fato em 1.º de janeiro de 1982 e posse de Direito após a apresentação do Relatório Financeiro de 1981.

Homenagem a Zamenhof - O Sr. Lázaro Brieger apresentou belo discurso em homenagem à data de nascimento de L.L. Zamenhof.

Homenagem ao Dr. Lauro Coutinho - O Cel. Jorge Campos de Oliveira prestou significativa homenagem ao Dr. Lauro Coutinho que doou aproximadamente 230 volumes de obras esperantistas deixadas pelo saudoso Antônio Caetano Coutinho.

Membro Benfeitor - Com base nos Estatutos da Liga, a Assembléia aprovou o nome do Dr. Lauro Coutinho como Membro Benfeitor.

☆☆☆

Resumo da Ata de 20 de novembro de 1982

No dia 20 de novembro de 1982, foi realizada a Assembléia Geral Ordinária da Liga Brasileira de Esperanto, em sua sede, sendo tratados os seguintes assuntos:

Relatório Financeiro de 1981 - O tesoureiro Aloísio Sartorato apresentou o relatório financeiro referente a 1981, que foi aprovado sem discussões.

Posse da nova Diretoria - O Dr. Sylla Chaves transmitiu o cargo de Presidente da Liga Brasileira de Esperanto ao Cel. Fernando José Galvão Marinho, eleito em 12 de dezembro de 1981, e convidou-o a dar posse aos demais membros da Diretoria e aos membros dos Conselhos Fiscal e Consultivo.

Quotas de adesão para 1983 - Foram aprovadas as seguintes quotas de adesão para 1983: MS Cr\$ 1.000,00; M1 Cr\$ 3.000,00; M2 Cr\$ 9.000,00; DM Cr\$ 90.000,00. Foi decidido que estes valores serão válidos até 30.06.83; após esta data, as quotas sofrerão o reajuste de 50%. Para os cursos por correspondência, a taxa de inscrição, até 30.06.83, será de Cr\$ 6.000,00, com reajustamento de 50% após 1.º de julho de 1983.

Assembléias de 1983 - Ficou deliberado que, em 1983, as reuniões estatutárias realizar-se-ão em 25 de junho e 29 de outubro.

☆☆☆

NEKROLOGO

Getúlio Soares de Araújo

Getúlio Soares de Araújo naskiĝis en la 17-a de Aprilo 1902, en la urbo Araruama (RJ) kaj mortis en Rio de Janeiro, la 4-an de Julio 1981.

En la aĝo de 3 jaroj, lia patro forpasis kaj frue Getúlio eklaboris por la vivteno de la familio.

Kun granda malfacilaĵo pro manko de monrimedoj li faris la elementan kurson en la lernejo; tamen kun granda energia volo kaj persisto li daŭre studadis tute sola.

Malnova esperantisto, li multe agadis en la Movado. Spiritisto, li estis multjara kunlaboranto de Brazilia Spiritisma Federacio.

PRI LA DEVENO DE LA VERDA KOLORO, LA STELO DE ESPERANTO KAJ LA UNUA ESPERANTISTA INSIGNO.

A. Caetano Coutinho

En la n-ro 3 (39), jaro IV, 15 Marto 1893, paĝo 47 de la monata gazeto "Esperantisto", kies redaktoro estis L. Zamenhof (Varsovia, Rusujo) kaj eldonanto-administranto W. H. Trompeter (Schalke, Westfalen, Germanujo), presita en la presejo de W. Tümmel, en Numbergo (Germanujo), sub la respondeco de Chr. Schmidt, prezidanto de la Klubo Esperantista Numbergo, oni legas la unuan informon pri la verda koloro kaj la stelo:

— "S-ro L. de Beaufront konsilas, ke la kovriloj de ĉiuj libroj de nia literaturo kaj entute ĉio, kio tuŝas nian aferon, havu verdan koloran kaj portu supre stelon. En tia maniero la verda koloro kun stelo (du simboloj de espero, esperanto) fariĝos la konstanta ekstera signo de nia afero kaj oni ĉiam tuj rekonos ĉion, kio apartenas al ĝi. Ni plene aprobas tiun ĉi ideon, kaj mi ĝin uzados de nun sur ĉiuj verkoj, kiujn mi eldonados. Ni proponas tion saman ankaŭ al niaj amikoj eldonantoj".

La duan informon oni renkontas en la n-ro 6 (42), 15 Junio 1893, paĝo 84. D-ro Zamenhof tiel revenis al la afero:

— "La propono de S-ro L. de Beaufront pri la stelo kiel signo por nia afero trovis grandan aprobon ĉe niaj amikoj. Ĉiuj niaj korespondantoj konsentas, ke tio ĉi estas la plej konvena signo por ni, kaj proponas diversajn detalojn por tiu ĉi signo. S-ro G. Rjabinin proponas, ke la signo prezentu malgrandan rondeton kun diametro de 2-3 centimetroj kun malgranda stelo en la mezo el tia metalo, kiun ĉiu volas; la stelo devas esti sur verda fundamento; la manieron kaj lokon de portado ĉiu povas elekti mem. S-ro P. Deullin proponas, ke oni akceptu simplan verdan stelon, el kiu ajn ŝtofo, laŭ la deziro de la uzanto, kaj sur kiu ajn loko, kun la surskribo: "LIGO ESPERANTISTA" aŭ "ESPERANTISTO". Ĉar preskaŭ ĉiuj aprobas la verdan koloron kaj stelon kaj jam longe multaj amikoj uzas en sia stampo la esprimon "Esperantisto", tial ni pensas ke la difinita signo de nia afero iom post iom fariĝos: verda koloro, stelo kaj la vorto "Esperanto" aŭ "Esperantisto". La detalojn, kiel ligi inter si la tri diritajn punktojn kaj en kia formo kaj loko ilin uzi, ni devas lasi al la bontrovo de ĉiu aparte, kaj ni esperas, ke ankaŭ en tio ĉi la tempo kaj uzo baldaŭ ellaboros ion difinitan".

Jam antaŭ ol S-ro de Beaufront pensis pri la koloro verda kaj la stelo, unu esperantisto skribis pri la signo por la samideanoj facile rekonu sin. Mi posedas la revuon "Esperantisto" nur de la jaroj 1893-94.

Sed en la Enciklopedio de Esperanto oni legas, ke "sur la paĝo 181 de "Esperantisto" 1892, S-ro B. G. Jonson, el Östersund proponis, ke la Esperantistoj akceptu ian difinitan signon, per kiu ili povus, renkontante sin, ekkoni unu la alian, ekzemple koloran silkan peceton, portatan sur la surtuta kolumo".

La n-ro 2 (38), Februaro 1893, paĝo 21, donas aprobojn kaj sugestojn al la propono de S-ro Jonson: la Vilnaja amikoj proponas brelokon; S-ro Matusiewicz sendas desegnon de breloko, prezentantan la monogramon de la vorto "Espero". Laŭ la opinio de S-ro Matusiewicz, tia breloko povus esti portata sur la ĉeneto de la poŝa horloĝo aŭ apud la nazumo (*pinçenez*).

En la n-ro 11 (47), Novembro 1893, S-ro Arnald Thörn el Böda (Svedujo) skribas, ke "estus bone kaj utile se ĉiuj esperantistoj en sia korespondado kiom eble plej multe uzados kovertojn kun nia signo (verda koloro kaj ora stelo) kaj kun konvena surskribo en lingvo Esperanto".

En sia n-ro 10 (58), Oktobro 1894, "Esperantisto" publikigis leteron de S-ro A. Prohoroviĉ: "En n-ro 12 de "Esperantisto" 1892 kaj en n-ro 6 de 1893, S-roj B. Jonson kaj G. Rjabinin proponis, ke ĉiuj esperantistoj portu egalan signon; mi jam longe pensis pri tio ĉi, kaj ŝajnas al mi ke tio estas tre bona rimedo por disvastigado de nia afero. Mi proponas ke ĉiuj esperantistoj portu malgrandan kvimpintan stelon el origita bronzo aŭ aluminio kun la surskribo "Esperanto". Oni volu porti ĝin sur la maldekstra flanko de la brusto. Sed estas necese, ke tiu signeto estu portata ĉiam kaj ĉie: en la domo, en la preĝejo, en la teatro, sur baloj kaj sur la stratoj; en vintro kaj somero, sur la vesto kaj sur la peltito, tiel, kiel oni portas akademian signon. Ĉiu, kiu deziros porti tian stelon, volu skribi al mi (adreso: Grodno (Rusujo), strato Pesoĉnaja, domo de Ramli, al A. V. Prohoroviĉ) kun la rimarko, kiom da ekzempleroj ili volas ricevi, kaj kun sia adreso. Se 2/3 de ĉiuj esperantistoj deziros porti tian stelon, tiam mi aĉetos kaj dissendos ilin al ĉiuj dezirantoj. Tia stelo (2/4 centimetrojn en diametro) el origita bronzo kostos 1 rublon, el pura oro — 8 rublojn, kune kun transsendo".

Ŝajnas, ke pro manko de sufiĉaj mendoj la oferto ne plenumiĝis.

En la n-ro 2. Februaro 1896 de "Lingvo Internacia", "monata gazeto por la lingvo Esperanto eldonata de la Klubo Esperantista en Upsala, Svedujo", en sia artikolo "El Francujo", S-ro L. de Beaufront skribis:

— "En la fino de longa artikolo kiun mi skribis por l' *Union Velocipedique de France*, la plej malnova societo de ciklistoj en Francujo, ni aludis pri ekstera signo speciala por Esperantistoj, almenaŭ la turistoj. Tiam ni denove turnas la atenton de la amikoj al tiu signo, pri kiu ni jam parolis en nia unua gazeto.

Ni pensas, ke por la rolo, kiun ĝi devas ludi, la plej bona kaj oportuna objekto estas ia speco de butono, analogia al tiu de multaj ciklistaj aŭ turistaj societoj. Tiel oni povos enmeti ĝin facile en la butonumon de sia vesto kaj ankaŭ demeti ĝin senpene. Jen

estas la priskribo de tiu signo: sur blanka emajla butono, de ĉirkaŭ du centimetroj da diametro, oni vidas, en la centro, verdan stelon kun oraj radioj. Super la stelo oni legas la vorton "Esperanto" skribitan en malgrandaj oraj literoj. Sub la stelo sin trovas du oraj branĉetoj de olivo, kruciĝantaj per la fino de iliaj trunketoj, kaj la butono estas rande ĉirkaŭita per ora streketo. Tiel farita, la signo sin prezentas belvida kaj la steleton oni distingas tre bone, kia ajn estas la nuanco de la nesto. Cetere la oro dolĉigas la krudecon de la kontrasto, kiu ekzistus sen ĝi, inter la blanka kaj verda koloro. La olivaj branĉetoj, simbolo de paco, sin kunigas feliĉe kun la signifo de la steleto, simbolo de espero, por fari pli simpatia al multaj homoj la signon, kiun ni proponas al la akcepto de niaj amikoj. La objekto ne kostus pli kare ol unu franko, laŭ fabrikanj informoj al ni donitaj en Parizo. Sed por tio estus necese, ke la mendo atingu la nombron de unu milo da ekzempleroj almenaŭ.

Oferante por Esperanto eĉ pli ol oni devus laŭ ordinara prudento, ni solaj ne povas entrepreni la efektiviĝon de tiu intencata signo. Sed se la amikoj ĝin aprobas, ili havu la bonecon skribi al ni kiom da ekzempleroj ili konsentas aĉeti. Tiam ni vidos ĉu tiu projekto povas tuj ricevi plenumon aŭ devas ankoraŭ esti prokrastata*.

La sekvantan martan numeron, en sia kutima artikolo, S-ro de Beaufront aldonis: "Dank' al kondiĉoj ankoraŭ pli bonaj, la signo kostos nur 75 centimojn kaj unu firmo akceptas la unuan mendon por 600 ekzempleroj".

Malgraŭ ĉi tiuj favoraj kondiĉoj, ankoraŭ ne efektiviĝis la plenumo de la insigno.

En "Lingvo Internacia", n-ro 34, Oktobro 1898, la rusa esperantisto F. Postnikov (kiu nun loĝas en Usono) presigis sur la 4 unuaj paĝoj longan artikolon — "Tri proponoj".

La unua propono estas:

— "En la Februara n-ro de "L. I." 1896 jaro la estimata franca esperantisto Beaufront (Bofron) proponis *apartan esperantistan signon* kaj priskribis ĝin. Tiu ĉi signeto, laŭ mia opino, estas tre bela, bongusta kaj konvena al ĉiu esperantisto. Tamen S-ro Beaufront devis prokrasti (se ne tute formeti) la plenumadon de sia projekto, ĉar por ke signeto kostu po 75 centimoj, oni devas mendi ne malpli ol 600 ekzempleroj (Vidu "L. I." 1896, Marto).

Dum mia nuna somera vojaĝo mi konatiĝis en urbo Revelo esta (1) fervora esperantisto s-ro Ŝtalberg, kies profesio estas juvelarto. Antaŭ mia forveturo, li prezentis al mi signeton preparitan de li mem, precize laŭ priskribo de s-ro Beaufront, sed nur sen olivaj branĉetoj. (Por memoro pri nia renkonto en Revelo, s-ro Ŝtalberg elgravuris daton kaj unu elvidon le urbo Revelo).

(1) "Estoj" — *Esti* — estas malgranda popolo (perenca al finnoj) ĉirkaŭunu millono, sub la regno de la rusa monarĥo. (Nun oni uzas: *estona*).

Mirigita per la rapida preparo de la gracia signeto. mi demandis ĉe li, ĉu li ne povos preparadi esperantajn signetojn por ĉiuj dezirantoj kaj pro kia prezo? Li respondis ke bronzajn "jetonojn" (jetono, signeto por portado sur vesto) li preparos po 25 kopekoj (0,25 rublo, ĉirkaŭ 70 centimoj); argentajn (pli elegantajn) po unu kaj duono da rublo (1,50 rublo, 4 frankoj). Sed transsendo estos je konto de mendanto. "Jetonojn" oni povas mendadi kun ringeto aŭ kun pinglo, tiu ĉi ne ŝanĝas la supre nomitan prezon. Kaj jen ĉu, kiu volos havi esperantistan signeton, povas sin turni je sekvanta adreso: Rusujo. Vezenberg. Peterburskaja ulca, al juvelisto Ŝtalberg".

Efektive, en la n-ro 36, Decembro 1898 de "Lingvo Internacia" oni trovas ĉi tiun anoncon de nia estona samideano (aŭtoro de du lernolibroj por la estonoj kaj de vortaro Esperanto-estona): — "Signetojn esperantistajn laŭ priskribo de s-ro de Beaufront (vidu "L.I." 1896, n-o 2) preparas kaj sendas ĉien juvelisto H. Ŝtalberg, Rusujo, Estl. gub. Vezenberg, Peterburga str. 97. La argentan signeton, kun pinglo aŭ kun ringeto (jetono) por rublo 1,50 (mi petas ĉiam skribi kiel oni deziras); la bronzajn (kupran) por rublo 0,50. Ĉiuj signetoj estas oritaj. La bronzajn mi preparas nun ankaŭ kun vera emajlo kaj tial mi devis plialtigi la prezon. Mi akceptas monon de ĉiuj landoj, sed ne povas akcepti poŝtsignojn krom rusaj. La transsendo kostas aparte kaj ekzemple en Rusujo je la maniero kiel mi povas sendi, ĉu en letero aŭ en kesteto de 14 kop. komencante, en alilandojn 20 kop komencante".

En la sekvantaj numeroj la anonco iom ŝanĝiĝis: "Oni povas pagi ankaŭ kun mono alilanda, se possible mi petas elekti monon anglan, francan, germanan, svedan aŭ unuig. Ŝtat. amer).

En la 60-a numero (Decembro 1900) S-ro Ŝtalberg anoncis: "Signetojn esperantistajn mi pretigas nun nur el argento kaj kostas la ekz. rubl. 1,50 sen transsendo. Signetojn el kupro mi ne pretigas pli".

La kompilanto de ĉi tiu artikolo mendis al s-ro Herman Ŝtalberg unu insignon el argento, kaj ankoraŭ ĝin posedas.

En Aŭgusto 1904 la grupoj esperantistaj de Calais (Francujo) kaj Dover (Anglujo), profitante la okazon de kurado de aŭtomobilaj boatoj organizita de la *Automobile-Club de France*, en la markolo *La Manche*, aranĝis internacian kunvenon, kiu kolektis

JE LA FLANKO DE LA PROFETO Italo Chiussi

Origine verkita en Esperanto
Serio "Oriento-Okcidento"
Cr\$ 2.300,00

120 samideanojn, precipe francajn, anglajn, sed ankaŭ kelkajn belgajn, ĉeĥajn kaj germanajn. Ĉi tiu kunveno tiel bone sukcesis, ke dum ĝi s-ro Alfred Michaux, advokato, proponis sian urbon *Boulogne-sur-Mer* kiel sidejon por internacia kunveno en la venonta jaro, kaj invitis ĉiujn por pli grava renkontiĝo en Bulonjo. Lia propono fakte okazigis la triumfan Unuan Universalan Kongreson de Esperanto, en 1905.

Ĉar komencis aperi tiutempe kelkaj varioj por la esperantista signo, la inĝeniero Pourcines, el Nancy, petis en la kunveno Calais-Dover, ke "unuforma signo estu alprenita, sed aliaj kontraŭstaris al deviga modelo". Fine, post diskuto, oni konkludis: — "La signo de rekono por la Esperantistoj, kiun oni rekomendas por la kunvenoj, vojaĝoj k. c. estas la verda kvinpinta stelo".

Guste tio kio estis jam proponita de s-ro de Beaufront, en "Esperantisto" de Marto 1893, kiel rememorigis "L'ESPERANTISTE", Septembro 1904.

La "Originala Verkaro" de L. L. Zamenhof, kolektita de D-ro Joh. Dietterle kaj belege eldonita de Internacia Cseh — Instituto de Esperanto, reproduktis sur la paĝo 456 leteron, kiun D-ro Zamenhof skribis

la 30-an de Setembro 1911 al "The British Esperantist", kaj presitan en ĉi tiu gazeto en ĝia n-ro de Aŭgusto 1912: — "Karaj Sinjoroj! Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min S-ro Geoghegan kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenco). Pri unu broŝuro kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke mi povas ja rigardi tiun koloron, kiel simbolon de Espero. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko S-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de ideoj aperis stelo kun verda koloro".

Kiel kuriozaĵo, mi mencias, ke kiel oni legas en interesa verko de D-ro Anakreon A. Stamatiadis ("Helena Esperantisto", n-oj 164 kaj 165, 1951), la insigno, kiun uzas la Pitagoranoj, t.e., la adeptoj de la fama helena filozofo Pitagoro, kiuj "profesas seninterrompan amikecon, reciprokan interhelpon kaj eternan fratecon inter si", estas, "per stranga koincido, kvinpinta verda stelo".



Bibliografio

La Turoj de l' Ĉefurbo, Mauro Nevi. Antaŭparolo de Aldo de' Giorgi. Esperantaj Kaje-roj, 1978. 119 p.

Poemoj kaj prozaĵoj.

☆☆☆

La Nova Butikisto de Nukugaia kaj Aliaj Noveloj, Bertram Potts. Stafeto, 1978. 250 p. Interesa originala novelaro.

☆☆☆

La Knaboj de Paŭlo-Strato, Ferenc Molnár. El la hungara tradukis Ladislao Somlai. Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 2-a eldono foto-repreŝe. 180 p.

Rakonto destinita por knaboj. Milito inter du grupoj de knaboj kun fino iom tragika.

☆☆☆

Apontamentos de Esperanto, A.S. Almeida. Portugala Esperanto-Asocio, 1978. 287 p. Taŭga lernolibro por progesantoj.

☆☆☆

Kara Diablino, Douglas P. Boatman. Stafeto, 1979. 112 p.

Misterromano kun parapsikologiaj elementoj.

☆☆☆

La Ingénia Hidalgo Don Quijote de la Mancha, Miguel de Cervantes Saavedra. El la hispana tradukis Fernando de Diego. Fundación de Esperanto, 1977. 820 p. Ilustrita de G. Doré.

Esperanta traduko de la majstroverko en la hispana literaturo.

☆☆☆

Venis Viro, Torben Nielsen. El la dana tradukis G. Riisberg. Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 75 p.

Tre interesa krimromano.

☆☆☆

Izolo, K. Kalocsay. Universala Esperanto-Asocio, 1977. 80 p.

Originala poemaro de unu el la gigantoj de la Esperanta literaturo.

Recenzo

Esperanta Songazeto, n-ro I. Enhavo – flanko A: Enkonduko, Nia Muzika Gasto: Johán Valano, Omaĝe al Mihály Sárosi; flanko B: Babelo, de Luigi Malerba. Bendofako de L.F. - Koop., Svislando, 1983.

Imagu, ke vi volas ĝui 1-horan Esperanto-programon. En la komenco, virina voĉo resumas la enhavon de la programo. Ĝi konsistas el du partoj. En la unua, vi aŭskultas kanzonojn de Johán Valano kaj fragmentojn de intervjuo dum la 33-a Internacia Junulara Kongreso, okazinta en 1977, en Poitiers, Francujo, kiam oni malkaŝis la veran identecon de Valano: Claude Piron. Kiel Johán Valano, Piron verkis la krimromanon “Ĉu vi kuiras ĉine?”, kiu ricevis la unuan premion “La verko de la jaro” asignita per referendumo fare de la abonantaro de Literatura Foiro.

Poste, ankoraŭ en la unua parto, venas “Omaĝe al Mihály Sárosi”. Kiu estis Mihály Sárosi? Li estis aktoro kaj kanzonisto. Dum la

I-a Mondmilito, Sárosi estis kaptita de la rusoj. En Siberio, li akiris por la tuta vivo la amikecon de la kolego kaj samsortano Julio Baghy, de kiu li lernis Esperanton. Inter la du Mondmilitoj, Sárosi aktoris, kantis, gitaris, komponis.

En la dua parto, nun vi aŭskultas la unuak-tan komedion “Babelo” de Luigi Malerba, en traduko de G. Capacchi; interpretas Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer.

Tiu Esperanto-programo ekzistas! Ĝi estas “Esperanta Songazeto”, eldonita de “Literatura Foiro”, Svislando. La programo estas tre interesa. Bona teksto de Giorgio Silfer. Klaraj voĉoj de Jacqueline Vasserot, Giorgio Silfer, Perla Martinelli kaj Nardino Totaro. Tarcisio Bisi estas la teknikisto kaj Gianfranco Molle komponis la ritmon.

Ni varme rekomendas la kasedon; ĝi ankaŭ taŭgas por riĉigi kluban kunvenon.

L.A.M.



Nova Strato

Per Dekreto n-ro 76 de la 6-a de Januaro 1983, D-ro José Karini, Prezidanto de la Komunuma Cambro de Pelotas, Ŝtato Rio Grande do Sul, donis la nomon Lazaro Zamenhof al strato en tiu urbo. Ni ŝuldas la iniciaton al la samideano Pedro Orestes Sorondo kaj la proponon al la Urba Konsilanto S-ro Jocarli Lozada.

Jen la teksto de la dekreto, en la portugala lingvo:

Dekreto n.º 76

Dá denominações a Ruas e uma Avenida

O Doutor José Karini, Presidente da Câmara Municipal de Pelotas, no uso das suas atribuições, e considerando haver o Plenário do Legislativo Municipal aprovado as respectivas proposições.

Decreto:

Art. 1.º – Passam a ter as seguintes denominações as Ruas e uma Avenida a seguir mencionadas:

I. Rua Doutor Edgard Vinhas de Campos, à Rua n.º 1 do Parque Residencial Arco-Íris.

II. Rua Nereu Nery da Cunha, à Rua n.º 2 do Parque Residencial Arco-Íris.

III. Rua Atílio Michelon, à Rua n.º 3 do Parque Residencial Arco-Íris.

IV. Rua Mario Requião Gastaud de Oliveira, à Rua n.º 8 do Bairro Navegantes II.

V. Rua Lázaro Zamenhof, à Rua n.º 10 do Bairro Navegantes II.

VI. Rua Manoel Pereira Bastos, à Rua n.º 32 do Núcleo Habitacional COHAB-RS, FRAGATA.

VII. Avenida Pery Ribas, à Avenida n.º 1 do Parque Residencial Arco-Íris.

Art. 2.º – Revogadas as disposições em contrário, este Decreto entra em vigor na data da sua publicação.

Gabinete da Presidência da Câmara Municipal de Pelotas, em 06 de Janeiro de 1983

Dr. José Karini
Presidente

MOZA IKO

Suspektinda Persono



TIO ĈI
ESTAS
E.T.

Saluton!

Post longa dormado (mia lasta kontribu-
aĵo aperis en *Impulso*, n.º 15, Nov/Dec 1970),
jen mi denove.

Ĉi-foje, mi volas prezenti al vi la ĉi-suban
suspektindanulon. Suspektinda, ĉar mi sus-
pektas, ke li estas esperantisto!

Ĉu vi ne kredas? Do, kontrolu vi mem:

1-e) Lia nomo estas E.T. (mallongigo de
esperantisto, kompreneble);

2-e) li estas verda (bedaŭrinde, "Brazila
Esperantisto" ne estas kolora revuo);

3-e) li estas neordinara estaĵo (do, sameki-
el ĉiuj esperantistoj);

4-e) la plenkreskuloj ne amas lin (nek
nin!);

5-e) fine, li apartenas al alia mondo (kia
koincido, ankaŭ ni, ĉu ne?).

Ĝis,

Ludoviko.

Pensoj de saĝuloj por ĉiu tago

Kolektitaj de L. Tosto

Lao Tse: "Plej potenca en la mondo estas
tio, kion oni povas nek vidi, nek aŭdi, nek
palpi."

Marko Aŭrelio: "La plej bona rimedo ven-
gi sin al ofendinto estas: ne sekvi lian ekzem-
plon."

Sankta Aŭgusteno: "La malbona homo

malutilas sin mem, kiam li intencas malutili
la aliajn."

Ruskin: "La scio estas senlima, kaj homo,
plej instruita laŭ la opinio de aliaj, estas same
malproksima de la vera ŝcio, kiel simpla vi-
laĝano."

Ridu, ni petas

Juĝisto — Mi rimarkas, ke vi ŝtelis ne nur
10 mil kruzejojn sed ankaŭ multe da ringoj,
horloĝoj kaj juveloj.

Akuzito — Jes, sinjoro. Mi memoris, ke la
mono sola ne portas feliĉon.

• •

Profesoro — Mi forgesis preni mian ombre-
lon kun mi.

Profesoredzino — Kiel vi eltrovis, ke vi for-
gesis ĝin?

Profesoro — Kiam la pluvo ĉesis fali, mi
levis mian manon por fermi la ombrelon.

• •

— Ĉu via edzino iris al la marbordo por la
somera libereco?

— Jes, mi bezonas ripozon.

• •

Instruisto — Tom, iru al la mapo kaj mon-
tru al mi Amerikon.

Tom — Jen estas.

Instruisto — Tio estas ĝusta. Nu, knaboj,
diru al mi, kiu eltrovis Amerikon?

Knaboj — Tom!!

• •

Mastrino — Ĉu vi balais la polvon sub la
tapiŝo?

Servistino — Kompreneble, mi balais ĝin
sub la tapiŝon.

• •

— Vi konas min de multaj jaroj, ĉu ne?

— Jes, certe.

— Pruntu al mi ŝilingon.

— Ne.

— Kial ne?

Tial, ke mi konas vin de multaj jaroj.



Nun, koni Brazilon
estas facile! . .

Hejme, vi kaj via familio povas vojaĝi tra Brazilo por. . .


TURISMA BRAZILO

Jes, via vojaĝo komenciĝos en la moderna Brasília; poste vi ĝuos la misteron kaj eventurojn en Amazonio. . . Baldaŭ vi estos en la kosmopolita São Paulo aŭ en la plaĝoj de Rio de Janeiro. . .

Ekde nun estas al via dispono vojaĝi tra Brazilo per malalta kosto. Brazila Esperanto-Ligo ebligas tion al vi! La firmao "V-Som Audio-Visuais e Editora Ltda". preparis altkvalitan materialon por vi!

TURISMA BRAZILO konsistas el 80 belaj koloraj diapozitivaj pri la ĉefaj brazilaj vidindaĵoj. Profesiaj fotistoj kaptis la plej belajn aspektojn de la brazila pejzaĝo por donaci al vi la allogajn turismajn scenojn de Brazilo.

En la albumo estas arkitekturaj verkoj koloniaj kaj barokaj, la insulo Marajó, kie



TURISMA BRAZILO estas liverita en plasta skatolo kun 80 diapozitivaj, 1 kasedo kaj teksto. La diapozitivaj venas en plastaj kadretoj numeritaj. La kasedo estas registrita laŭ plej moderna tekniko kun sonefektoj.

Vi povas facile uzi la materialon per ordinaraĵoj projekciilo kaj kasedreprodukti-



vivas bubaloj, la Marĉejo en Ŝtato Mato Grosso do Sul, la 40 akvofaloj en la rivero Iguaçu. . .

Vi vidos bildojn de la Nacia Parko de la Sep Urbojn, en Ŝtato Piauí, la plaĝoj Boa Viagem en Recife, Farol en Salvador, Copacabana kaj Ipanema en Rio de Janeiro. . .

Plezurigos vin fotoj de "Vitoria Regia", kies folioj foje atingas du metrojn en diametro, danĝeraj felisoj, la delikata birdo "Guará" kun ruĝaj plumoj, simila al la nevo, gigantaj arboj, k.t.p.

lo. Tempodaŭro de la kasedo: 14 minutoj.

TURISMA BRAZILO estas havebla en jenaj lingvoj:

Esperanto-Portugala
Esperanto-Franca
Esperanto-Germana
Esperanto-Hispana
Esperanto-Angla

Prezo por:

Brazilo - Cr\$ 18.000,00 + sendkosto

Eksterlando - US\$ 32.00 + sendkosto